Libro	Prezo
<i>Esperanto por Gimnazianoj</i>	
Textbok	300
Ŭvningbok	300
Handledning	300
Monumente pri Esperanto de Hugo Röllinger	75
La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson, Selma Lagerlöf	265
Baza Esperanta Radikaro W F Pilger	75
Lilla esperanto-ordboken de Ebbe Vilborg	75
Etimologia Vortaro de Esperanto 1-5	585
Vojaĝo en Esperanto-lando de Boris Kolker	165
Dek tagoj de Kapitano Postnikov, Mikaelo Bronŝtejn	180
Ordbok Svenska-Esperanto de Ebbe Vilborg	382

Sendkostoj aldoniĝas.

Libroservo atendas vian vokon! Tel: 08-340 800. sef@esperanto.se



## Multaj uzas lernu!

Registriĝis la 10 000-a uzanto de la reta Esperanto-kursejo **lernu!** ĉe [www.lernu.net](http://www.lernu.net).

Tiuokaze, la 30-jara novregistriĝinto Luis Sancho el Porto, Portugalio, ricevos donace Esperanto-libron de UEA kaj TEJO kaj informmaterialojn de Esperanto@Interreto. Dankon al Chuck Smith kiu kunordigas tion!

Krom ok diversnivelaĵoj kaj diversmetodajn Esperanto-kursojn, lernu! ofertas ankaŭ tre diversajn helpilojn por lernado de Esperanto kaj informiĝo pri ĝi, inkluzive virtualajn lecionojn, vortarojn, ekzercojn, ekzamenojn, son- kaj film-materialon, ekzemplojn de Esperanto-kulturo, ludojn, aktualajn novaĵojn pri la movado, tujmesaĝilon kaj pli. Ekde la 27-a de aprilo 2004 la paĝaro havis 48 000 vizitojn (pli ol 9 000 vizitojn monate), kaj dum la lastaj monatoj ĉiutage registriĝas averaĝe ĉ. 24 novaj uzantoj. Pli detalajn statistikojn pri aktiveco de uzantoj, iliaj devenlandoj, lingvoj en kiuj uzas la paĝaron, aĝoj, Esperanto-niveloj, sukceso ĉe unuopaj kursoj k.s. vi trovos ĉiam ĝisdataj ĉe [www.lernu.net](http://www.lernu.net).

## Estraro de UEA

Post sia elekto en Pekino la membroj de la nova Estraro de UEA decidis pri sia taskodivido, kiu baziĝas sur la agadkampoj, pri kiuj la estraranoj esprimis intereson kaj pretecon, kiam

ili ankoraŭ estis kandidatoj.

Prezidanto *Renato Corsetti* respondecas pri ĝenerala planado, eksteraj rilatoj kaj informado. Vicprezidanto *Claude Nourmont* transprenis la agadkampojn kulturo kaj kongresoj, dum la fakon de ĝenerala sekretario *Ulla Luin* difinas ĝia titolo. Same kiel en la antaŭa Estraro, *Ans Bakker-ten Hagen* respondecas en sia dua mandatperiodo pri financoj kaj administrado. Kiel plian respondecon ŝi transprenis la rilatojn kun TEJO. *Maritza Gutiérrez González* estas estrarano pri landa agado, dum *Yu Tao* aparte respondecas pri la agado en Azio kaj krome pri kreado de nova strukturo de Amikoj de Esperanto. Al konata tereno revenas *Amri Wandel*, kiu havas en sia dosierujo fakan kaj sciencan agadon, pri kiuj li okupiĝis ankaŭ en la Estraro de *Lee Chong-Yeong* en 1995-1998.

Neniu el la elektitaj estraranoj kandidatiĝis por informado, pro kio prezidanto *Corsetti* transprenis la estraran respondecon pri ĝi. Por malpli-peziĝi lian ampleksan taskaron la Estraro elektis komitatanojn *Jukka Pietiläinen* kiel specialan komisiiton pri informado por funkcii kiel la dekstra mano de la prezidanto sur tiu grava kampo.

## Novaj akademianoj

Sep novaj akademianoj el kvar kontinentoj estis elektitaj en la ĵusaj elektoj al la Akademio de Esperanto. Ĉiuj no-

vaj akademianoj estas viroj. Ankaŭ inter la kandidatoj ne estis virinoj. Novaj anoj de la Akademio estas Dao Anh Kha, Marc Bavant, Gbego Koffi, Otto Haszpra, Otto Prytz, Flavio Rello kaj Francisko Simonnet.

La membroj de la Akademio de Esperanto havas naŭjaran mandaton, kaj ĉiun trian jaron finiĝas la mandatperiodo de unu triono el la akademianoj. Sekve ĉiun trian jaron okazas elektoj en kiuj voĉdonas nur akademianoj, kaj tiam estas ankaŭ elektata la estraro de la Akademio. Ĉi-foje estis elektitaj ne dek kvin, sed dek ses akademianoj, ĉar unu akademiano forpasis dum la elektoj.

## Pli da membroj en UEA

Provizora statistiko fine de aŭgusto montras, ke post kelkajara malkreskado la membronombro de Universala Esperanto-Asocio turniĝis en senteban kreskon. La malkresko ĉesis jam pasintjare, kiam UEA havis je unu individua membro pli ol en la jaro 2002, dum la nombro de aligitaj membroj jam tiam klare kreskis kaj superis per 715 la nombron de la antaŭa jaro. Fine de aŭgusto 2004 UEA nombris 5615 individuajn membrojn, kio superas per 167 la nombron je la sama dato en 2003. Rimarkinde estas, ke la nombro de aligitaj membroj jam nun estas je 606 super la definitiva rezulto en 2003, kvankam kvin asocioj ankoraŭ ne pagis tiun kotizon. Surbaze de la ĝisnuna evoluo la Centra Oficejo antaŭvidas, ke la suma kresko de la membraro de UEA en tiu ĉi jaro estos ĉ. 1000.

Gojiga detalo estas, ke unuafoje de post 1997 ree plimultiĝas junaj individuaj membroj. Fine de aŭgusto la junulara sekcio TEJO arigis 419 individuajn membrojn, kio jam superas per 20 la definitivitan nombron en 2003. Kompare kun la fino de aŭgusto 2003 la junaj membroj plimultiĝis eĉ per 64. Kreskas ankaŭ la populareco de la revuo "Esperanto", dum la nombro de membroj kun Jarlibro ankoraŭ estas sub tiu de la pasinta jaro. Ĉar la nombro de unuamondaj aliĝintoj al la ĉi-jara UK estis apenaŭ duono de la pasintjara nombro, la Jarlibra kategorio ne profitis de la t.n. kongresa efiko. Verŝajne ĝi tamen ankoraŭ ĉi-jare ĝuos tiun profiton dank' al tiuj aliĝintoj al la UK en Vilno, kiuj pagos kongresan kotizon en la plej malmultekosta periodo antaŭ la fino de la jaro kaj samtempe kotizos ankaŭ al UEA.

## Universala Kongreso de Esperanto Vilnius 23-30 juli 2005

### Anmälningavgifter (Svenska kronor)

	—31 dec	—31 mars	1 apr—
1. Direkt medlem i UEA (ej MG)	1380 kr	1750 kr	2115 kr
2. Icke direkt medlem i UEA	1750 kr	2160 kr	2580 kr
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (född mellan 75-01-01 och 84-12-31), som är medlem i UEA	690 kr	785 kr	1060 kr
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA. Handikappassistenter och ungdomar födda efter 84-12-31 betalar ingen kongressavgift.	1060 kr	1290 kr	1565 kr

Anmälningblankett för kongressen kan beställas hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby, tel. 0415-50152. Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till SEF Specialkonto, postgiro 14 74 29-5. Ange på talongen vad pengarna avser.



## TEJO serĉas volontulon

TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) serĉas volontulon por la Centra Oficejo en Roterdamo. Estas bonega ŝanco por gejunuloj kiuj volus havi interesan kaj bonan sperton pri la tutmonda junulara E-movado! Kompreneble estas ankaŭ ege bona ŝanco renkonti afablajn geesperantistojn el la tuta mondo!

La voluntulo devas preti labori dum 8–18 monatoj. La laboro konsistas el: aktiva kunlaboro en la aktualiĝo de la retpaĝoj de TEJO, eventuala redaktado de TEJO-Aktuale, adminis-

trado kaj prizorgado de kontaktoj kun eŭropaj kaj neeŭropaj strukturoj, organizoj kaj aktiva kunlaborado en la verkado de subvencipetoj.

TEJO volas inter alie ke la voluntulo laŭeble: havu tre bonan Esperantonivelon (legan, skriban kaj parolan), scipovu la anglan (aŭ) francan, ŝatu administran laboron, kaj havu profundajn konojn de la junulara Esperanto-movado.

La voluntulo ricevas senkoston ĉambron en la centra oficejo kaj dignan poŝmonon kiu garantias la vivtenon.

Kandidatoj estas invititaj sendi al la Centra Oficejo de TEJO (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando) la jenajn doku-

mentojn: vivresumon, motivigan leteron, kaj laŭeble pruvilojn de viaj kapabloj.

Por pli da informoj rigardu la lastan numeron de TEJO tutmonde (bv skribu al [seju@esperanto.se](mailto:seju@esperanto.se) se vi ne havas eblecon legi ĝin kaj ni povus sendi ekzempleron al vi).

Se vi kandidatigas per retpoŝto, bv skribi kaj al [oficejo@tejo.org](mailto:oficejo@tejo.org) kaj [estraro@tejo.org](mailto:estraro@tejo.org)

## Novjaro 04/05 en Germanio!

Baldaŭ okazos unu el la plej popularaj renkontiĝoj de junaj geesperantistoj. Temas pri la internacia seminario (IS), kiu ĉijare okazos ĉirkaŭ novjaro, inter 2004-12-27 kaj 2005-01-03. La organizantoj estas Germana Esperanto-Junularo.

Ĉi tiu seminario estas ege populara inter la junaj esperantistoj kaj verŝajne ĉiuj partoprenantoj havos bonegan tempon tie!

Oni povas aŭskulti prelegojn, partopreni diskutojn ktp, sed certe ankaŭ abundos eblecoj festeni kaj renkonti afablajn gejunulojn!

La temo de la renkontiĝo en ĉi tiu jaro estos: "Kulturaj diversecoj – problemoj kaj perspektivoj". Por pli da informoj vi povas rigardi la hejmpaĝon de la seminario: [www.esperanto.de/is/de/2004/](http://www.esperanto.de/is/de/2004/)

## Insamling av gammalt SEJU- material

Sedan i våras pågår inom SEJU ett insamlingsprojekt av gammalt SEJU-material (tex protokoll från möten, foton, reseberättelser mm). Syftet är att samla allt material på ett ställe för att eventuellt kunna göra en historisk sammanställning i framtiden. Nu misstänker vi att det ligger en del gammalt material och "skräpar" på folks vindar och i andra utrymmen. Om du känner med dig att du har gammalt SEJU-material som du inte hemskt gärna vill behålla själv, så skulle vi inom SEJU vara tacksamma för att ta överta detta. Kontakta oss i så fall på: [seju@esperanto.se](mailto:seju@esperanto.se) eller kontakta Daniel Granello på tel: 0730- 22 57 37. Tack på förhand!

Nu är det tid att betala UEA-avgiften för år 2005

## UEA behöver dig Du behöver UEA

Ett starkt UEA kan hävda sig bättre i en värld, som idag mer än någonsin behöver ett neutralt språk. Stöd därför UEA med ditt medlemskap.

För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adress på delegater i hundratalet länder, och om du är MA-medlem, får du även tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

Lisbet Andreasson  
Södra Rörum  
Husarlyckevägen 29  
242 94 Hörby  
tel. 0415-50152

Avgifterna för år 2005 är följande:


### Kategori

<b>MA</b>	Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår!	500 kr
<b>MJ</b>	Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan!	200 kr
<b>MG</b>	Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift.	80 kr
<b>SZ</b>	Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA	1 000 kr
<b>PT</b>	"Patrono de TEJO", får tidningen Kontakto.	600 kr
<b>DM</b>	"Dumviva membro" betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken.	12 500 kr
<b>DMJ</b>	"Dumviva membro kun jarlibro" betalar för hela livet. Får årsboken.	5.000 kr
<b>DPat</b>	"Dumviva Patrono" betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständigt medlem i "Societo Zamenhof".	125 000 kr
<b>DPT</b>	"Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet och får tidningen Kontakto.	15 000 kr

# EPoGo, Esperanto por Gimnazianoj

## ESPERANTO-PLATSEN DANĜERA LOKO — POR ALKOJ

La sveda nacia novajagentejo kaj la sveda tutlanda radio raportis, ke alko aperis iun tagon en la centro de Gotenburgo, la pasintjara UK-urbo, kaj kaŭzis grandajn problemojn en la urba trafiko. Polico provis dum pli ol horo komprenigi al ĝi, ke ĝi reiru al sia natura loko, arbaroj, sed tion ĝi ne komprenis. Je plej alta nivelo oni decidis do pafi la alkon — kaj tio okazis sur Esperantoplatzen, kie la kompatinda besto esperis ricevi protekton.



Lars Forsman, Christer Lörnemark, Kjell Randedhed kaj Folke Wedlin: **EPoGo, Esperanto por Gimnazianoj**. Textbok. Övningsbok. Handledning. 300 kr por ĉiu parto.

Eldoniĝis lernolibro por svedaj gimnazianoj kun titolo bazita sur la siglo de la propra subtitolo; EPoGo, Esperanto por Gimnazianoj. Enkonduke (p. 9) la kvar aŭtoroj, ĉiuj profesiaj instruistoj, Lars Forsman, Christer Lörnemark, Kjell Randedhed kaj Folke Wedlin emfazas la rajton pri "... la diverseco kaj lingva demokratio pri kiuj multaj parolas sed malmultaj komprenis kiel efektiviĝi en la monda societo." [Mia trad.]

Ekster Dubrovniko antaŭ dek tri jaroj estis ordonite en la serbokroata pafi grenadojn en la urbon. Antaŭ kvin jaroj estis ordonite en la angla bombi Jugoslavion. La politikistoj kaj militistoj interŝanĝis postulojn kaj ultimatojn anstataŭ interkompreno elvokita de komuna neŭtrala lingvo.

En la nova lernolibro sveda gimnaziano, kun la internacia nomo Andreo, vojaĝas i.a. en eks-Jugoslavio. En la urbo Dubrovniko en Kroatio li iras al la haveno, kaj hazarde ...

"Ĝuste tiam Andreo vidis grandan verdan stelon sur la antaŭo de la boato ..."

Ni ja rajtas revii, revii pri mondo de lingva interkompreno kaj kultura egaleco.

La libro estas rimedo por instruistoj oferti revojn al siaj adoleskaj gelnantoj. La revoj de Andreo tamen rilatas la ĉefrolulinon, kiu estas dotita per la tradicia sveda nomo Emma,

eble malfacile tradukebla en la internacian lingvon.

Laŭ unua impresado estas lernilo kun profesia aspekto. Ĝi ampleksas tekstlibron, ekzercaron, manlibron kaj kompaktdiskon, el kiuj mi vidis la du unuajn. Nur tiuj ilustraĵoj kiuj originale estis nigraj-blankaj reproduktiĝis same, cetere abundas la ĝojigaj helaj koloroj. Simile la teksto flamas bunte kaj senretene per lingvaĵo gejunula aŭ kvazaŭgejunula, gaja kaj antaŭen rigardanta. Oni trinkas kokakolaon kaj bieron, retbabilas, trajnavagas kaj ludas rokmuzikon. Persone mi foje lernas nomon de rokgrupo kaj baldaŭ konstatas ke ĝi ĵus fariĝis eksmoda. Sed mi fidus la junecan spiriton de la aŭtoroj. Ĝi malkaŝas sin i.a. per "fekterminareto", tiel dirite (p. 45). Aliflanke ŝajnas ke oni saĝe ne tro volas turmenti la studentojn per gramatikaj fakterminoj, precipe per la malpli oftaj kaj malpli gravaj.

Laŭ sia ekstera formo la tekstlibro estas relative tradicia; teksto pri la du gejunuloj en ĉiutagaj aŭ iomete aventuraj cirkonstancoj sekvata de poĉa-pitra vortareto kaj gramatikaj komentoj. La aŭtoroj klopodis aranĝi la glosarojn laŭ temoj, "prepozicioj", "trafikiloj", "la sezonoj", "korpopartoj", komputila vortareto k.t.p., sendube racia konkludo laŭ spertoj de lingvoinstruado. Fine de ĉiu ĉapitro oni trovas faktojn pri Esperanto (kaj mondlingvoj) kaj krome proverbon. Certe povas vekti la intereson ĉe studentoj.

La ekzercaro same kiel la tekstlibro havas tradician fundamenton, sed kun moderna profesia aspekto. Ĉi tie abundas ilustraĵoj ĉefe fotoj sed ankaŭ desegnaĵoj. En la glosaro, kiu formas la duan parton de la tekstlibro post la ĉapitroj, la vortoj estas aranĝitaj laŭ la ordo en kiu ili aperas en la teksto. Leganto kiu deziras laŭalfabetan vortaron, tion trovas en la dua duono de la ekzercaro. Preskaŭ kvaronon de la tekstlibro kaj duonon de la ekzercaro okupas la glosaroj, indiko pri abunda vortprovizo enkondukita per la libro. Ĉu tro ampleksa vortprovizo en la tekstoj? Mi lasas la demandon nedecidita.

Miaopinie oni malŝparis tro da spaco per nur du kolumnoj plej ofte okupataj per po unu vorto. Estas peniga laboro devigi la gejunulojn asocii vorton fremdlingvan kun ĝia nocio, ne kun unuvorta traduko. Sed pli

da tiaj plursencaj tradukoj helpas ilin ekpensi pri sinonimoj kaj nuancoj, kaj eble konsekvence pri la karaktero de la lingva leksiko.

Antaŭparole oni ankaŭ rekomendas la libron por memstudado. Tio postulos la manlibron kun solvoj kaj respondoj al la ekzercoj. Cetere kelkaj el la ekzercoj streĉas la memoron pri la enhavo de la dialogoj, tiel iom vualantaj la lingvan komprenon de la teksto. Tio validas almenaŭ por tiuj kompatindaj legantoj, kiuj ne havas pli bonan memoron ol mi. La multaj ekzercoj estas bona helpo por la ambicia studento. Nur en kelkaj ekzercoj mi malhavas kompletan demandon. Oni subkomprenis, ke temas pri traduka ekzerco aŭ kompletigezercok.s. Tio povus perpleksigi eĉ studenton malpli senilan ol mi.

Kvankam estas la unua eldono de la lernilo tre malmultaj eraroj aperas. Eble rezulte de la sveda malfacilo prononci la fonemon [z], kiun malhavas nia lingvo, fariĝis "rezulto" en unu proverbo. Resume alia proverbo (p. 59) el la libro klarigas dilemon de instruisto: "Plej longa vivosperto ne kondukas al tutcerto". En lernejo kun tri instruistoj oni uzas almenaŭ kvar pedagogiajn metodojn. Ĉi tiu lernilo provizas la instruiston ne per kvina pedagogia metodo sed per kompleta labormaterialo, kiu stimulas la pedagogian laboron. Feliĉe ni nun havas modernan kaj zorgeme prilaboritan lernilon en la sveda lingvo.

Jan Setréus  
eksinstruisto

## LINGVO

### Pri "multe da" kaj "multa"

Estas diferenco inter "multaj homoj" kaj "multe da homoj": "multaj homoj" = diversaj homoj (ĉiu aparte); "multe da homoj" = granda nombro da homoj (kune).

#### Zamenhof en "Lingvaj Respondoj"

La Espero bezonas helpredaktoron por la rubriko "Lingvo". Ĉu vi pretas skribi artikoleton pri lingvaj aferoj por ĉiu numero de la revuo? Kontaktigu kun la redaktoro.

# letero de la estraro

## Taskoj de la estraro

La jarkunvenoj de SEF ne nur elektas estraranojn, kiuj gvidu la asocion, sed ankaŭ donas al ili pli malpli konkretajn taskojn. Jen venas mallonga raporto pri la taskoj donitaj dum la jarkunveno en Lesjöfors en majo 2004 kaj kio ĝis nun okazis pri ili, kaj pri kelkaj taskoj, kiujn la estraro mem donis al si:

### 1. Statuto

Estis akceptita nova statuto, kiu baziĝas sur la principo unu membro – unu voĉo. La reviziita statuto aperos en La Espero n-ro 1 de 2005. Ĝi ekvalidos, se la venonta jarkunveno konfirmos ĝin.

### 2. Perspektiva laborplano

La estraro ekdiskutis tian planon kaj planas konkretigi ĝin ĝis la fino de la jaro. Ne estas ankoraŭ decidite, kiel diskonigi ĝin.

### 3. La Espero

Ne okazis "ronda tablo" pri La Espero, pro la maleblo de la redaktoro partopreni similan aranĝon ĉi aŭtune. Okazis tamen en Lesjöfors, lige kun la jarkunveno de Esperanto-Gården, diskuto, en kiu partoprenis i.a. tri estraranoj. Resumon de tiu diskuto vi povas legi sur aldono al La Espero.

### 4. Esperanto-Centro

Estis starigita laborgrupo, kiu priesploris la rolon kaj estontecon de Esperanto-Centro Stockholm. Pro la bona laboro de tiu grupo, aro da membroj kontribuis kaj pretas daŭre kontribui ekonomie, por ke SEF havu oficejon kaj "montrofenestron" en la ĉefurbo. Tiu "montrofenestro" ankaŭ ricevis bezonatan refreŝigon, por pli bone funkcii kiel informejo kaj diskutejo.

### 5. "Skolforum"

Estis decidite partopreni, se kelkaj membroj pretos subteni la partoprenon ekonomie. Laŭ raporto alie en La Espero vi povas vidi, ke la membroj malavare subtenis la ideon. Speciala danko al Kaisa Hansen, kiu iniciatis la monkkolekton!

### 6. Gvidlinioj por kluboj

Aperas jen kaj jen emo krei novajn esperanto-klubojn. La estraro starigos laborgrupon, kiu ellaboru gvidliniojn por kreo de novaj kluboj resp. revivigo de kluboj, kiuj malaktiviĝis. Ĉu vi pretus esti en tiu laborgrupo?

### 7. Informado al svedaj EU-parlamentanoj

Estas starigota laborgrupo por daŭra informado al la svedaj EU-parlamentanoj. Mankas ankoraŭ gvidanto de tiu grupo. Ĉu vi kandidatas?

## Kiu faras kion en la estraro

- Prezidanto: Franko Luin, tel. 08-712 82 91, franko@esperanto.se
- Sekretario: Katja Ignatieva, tel. 0707-69 56 30, katja@tejo.org
- Financoj: Sjoerd Bosga, tel. 021-41 70 45, 0705-14 50 18, sjoerd@esperanto.se
- Informado: Martin Strid, tel. 0243-124 80, 070-315 26 15, martin.strid@sverige.nu
- Edukado: Fredrik Olofsson, tel. 0300-54 14 55, f.olofsson@tele2.se
- Interreta radio/fonoteko: Wim Posthuma, tel. 021-13 35 29, wim.posthuma@esperanto.se
- Kongresoj: Roland Lindblom, tel. 08-777 41 75, roland@esperanto.se
- La Espero: Leif Nordenstorm, tel. 0921-123 54, nordenstorm@globalnet.net

## POEZIO

### PRI GOTENBURGAJ TRAMOJ

Laŭdata estu vi, haven' nordmara!  
Holando vin beligis per kanaloj;  
Nun benas vin tramservo senkompara,  
Ligante urbokoron kun kvartaloj.

Por ĉiu celo tramo min atendas,  
Blublanka kaj brilega la livreo;  
La pordoj kiel koncertin' sin fendas,  
Pelataj de elektro per troleo.

Salutas min maŝino aŭtomata  
Per kiu validiĝas la biletoj;  
Ekzumas nia ĉaro demokrata,  
Vikinga ŝipo sur pavimŝtonetoj.

Preĝej' germana dekstre preterglitas,  
Fulmetas akvo sub ĉielo blua;  
Arganoj fiere konkurencon spitas  
En tiu nobla urbo ŝipkonstrua.

Famuloj svedaj festas sur la vojo,  
ĉe August Strindberg vibras la lipharoj,  
Ekkantas sveda najtingal' pro ĝojo,  
Responde pulsas ABBA kun gitaroj.

Kaj kiam ĉe kvartala finstacio  
Alvokas hejmoj inter koniferoj,  
Refendas sin la pordoj kun gracio -  
Fantome malaperas pasaĝeroj.

Do: kiam ankaŭ mi fantomo estos  
Mi flugos nek al aŭto nek al pramo,  
Eĉ ne vesperte en tureto restos,  
Ho ne – prefere gotenburga tramo!

Jack Warren

## Vortoj de la redaktoro

La redaktoro de La Espero volas danki al ĉiuj, kiuj sendis kontribuojn al tiu ĉi numero.

Al tiu ĉi numero alvenis tiom da materialo, ke la revuo fariĝis iom densa. Tamen ne hezitu sendi materialon.

Montriĝis, ke multaj legantoj volas mallongajn noticojn. Tial raportu mallonge pri io. Verku ankaŭ iom pri via fako aŭ intereso por la rubriko "Temo".

La redaktoro

# Diskuto pri La Espero

Aldono al La Espero 2004:6

Pli mallongaj artikoloj! Pli da debato! Pli da kunlaborantoj! Dulingvaj tekstoj! Jen kelkaj el la opinioj pri La Espero. Dek kvin el la partoprenantoj de la semajnfino en Lesjöfors (9-10 oktobro) diskutis, kaj havis multajn opiniojn pri la enhavo kaj produktado de La Espero.

La gazeto havas nun firmajn datojn kaj aperas en tempo. La enhavo ĝenerale pliboniĝis. Nun ni deziras evoluon kun pli da kunlaborantoj, kaj kun pli da strukturo je la enhavo. Ĉu tio eblas?

## SEKCIOJ

Jen aro da deziroj pri la strukturo de la enhavo, kaj en kelkaj kazoj deziroj pri plia enhavo de la gazeto.

### • Kalendaro pri estontaj planataj aranĝoj

Lastatempe okazis, ke aranĝoj koliziis, pro manko de scioj aŭ pro manko de frua planado. Estus bone se iu kolektos minimume la datojn de planataj svedaj aranĝoj, kune kun telefonnumero por pliaj informoj. Ankaŭ iom gravaj eksterlandaj aranĝoj povus esti en la kalendaro.

### • Kontaktpersonoj

Pli ofta publikigo de la nomoj kaj telefonnumeroj de estraranoj de SEF, kune kun informo pri la taskoj, estas deziro. Sed ankaŭ kontaktpersonoj en la kluboj, en la diversaj esperanto-organizaĵoj kiel Esperantogården kaj Eldona Societo Esperanto kaj tiel plu, estas dezirataj.

### • Raportoj

Estas grave montri al svedaj esperantistoj, kio okazis en la kluboj, ne nur por la propra klubo. La raportoj ne estu miksitaj kun informoj pri estontaj planataj aranĝoj. Interese estas ankaŭ publikigi mallongajn raportojn pri kunvenoj en aliaj landoj, kiujn iu partoprenis. Tio donas bonan materialon al aliaj membroj, kiuj volas respondi al demando, kion esperantistoj nuntempe faras. Pli da kunlaborantoj necesas por pli evoluigi tion!

### • Mallonge pri fakaj temoj

Multaj membroj havas sciojn pri diversaj temoj, kaj eble povas verki mallongajn artikolojn pri tiuj temoj. Tio estas maniero lerni pli da vortoj, por tiu kiu verkas, kaj ankaŭ por tiuj kiuj legas. Tiaj kontribuaj bezonas lingvan helpon de pli spertaj esperantistoj. Kunlaborantoj bezonataj!

### • Debato

Sekcio pri ensendaĵoj, kun pli striktaj instrukcioj pri longeco, kaj kun pli klara rubriko, ke temas pri debato, estas dezirata. Same kiel en aliaj gazetoj, necesas trovi kunlaboranton, kiu redaktu aŭ mallongigu la tekstojn, kaj eble necesas mallonge skribi laŭ kiuj principoj la redakcio faru tion.

### • Prezidanto aŭ estrarano de SEF

La estraro de SEF devus pli atenti, ke en ĉiu numero estu artikolo de la prezidanto aŭ alia estrarano pri la laboro de la estraro. Tiu artikolo devas troviĝi en iom simila loko en ĉiu numero.

### • Enhavtabelo kaj enkonduketoj

Sur la unua paĝo estas dezirinde skribi, je kiu paĝo troviĝas la diversaj sekcioj de la gazeto. Se eble estu ankaŭ tre mallonga enkonduko pri la ĉefaj artikoloj, en simila maniero kiel la tagaj ĵurnaloj faras.

### • Dulingvaj artikoloj

Jen pli malfacila deziro: unu el la artikoloj en la gazeto aperu en du lingvoj. Tio ja signifas, ke la artikolo devas alveni pli

frue al la redaktoro/kunlaboranto, aŭ ke tiu kiu verkas la artikolon devas verki jam dekomence en du lingvoj. Necesas ankaŭ iu signo ĉe la artikolo, por ke komencanto trovu tiun artikolon.

### • Junularo

Jam nun, SEJU havas propran sekcion en la gazeto.

### • El aliaj esperantogazetoj

Tiuj kiuj abonas aliajn esperantogazetojn povus skribi pri tiuj gazetoj, por ke ĉiuj membroj sentu ke esperantomovado ne estas nur Svedio. Tiu ĉi deziro ja postulas kunordigon de plia kunlaboranto.

## LA ENHAVO TRA LA JARO

### • Pli mallongaj artikoloj

Pluraj el la ĉeestantoj opiniis, ke artikoloj ofte estas tro longaj. Tiu ĉi punkto ja rilatas al la bezono de pliaj kunlaborantoj, ĉar estas temporabe mallongigi.

### • La unua numero post la somero

En la somero okazas pluraj gravaj eventoj de la esperantomovado, ekzemple la universala kongreso. Estas dezirinde plani la eldonon en tia maniero, ke raportoj el la kongresoj kaj someraj renkontiĝoj aperu en la unua numero post la somero. La posta numero ofte aperas nur en novembro. Por rapidaj raportoj eble necesas kunordiganto!

### • Aldona folio en la sveda

Ideo venis pri aldona folio en la sveda, kelkfoje jare, kun informoj pri "Esperanto just nu". Estu ebleco kopii ĝin aŭ rekte doni ĝin al iu, kiu interesigas pri esperanto. Necesas aparta redaktoro aŭ kunlaboranto pri tio.

## ADMINISTRADO

Pli da kunlaborantoj signifas multe pli da administrado por produkti la gazeton.

Unuavice la administra tasko estus trovi la kunlaborantojn! La ideo ne estas pli ŝarĝi la redaktoron, sed kontraŭe, la ideo estas dividi la laboron kaj ebligi al pli da membroj utiligi la gazeton.

Diskuto pri utiligo de la interreto, ekzemple por la kalendaro, restis nur diskuto. Ne ĉiuj havas sciojn aŭ aparatojn por liveri materialon en tiu maniero. Ankaŭ diskuto pri administrado de retpoŝta adreso, por ne perdi tekstojn de disaj kunlaborantoj, restis nur diskuto.

## EKONOMIO

La ekonomio de SEF ja estas premita. La kostoj de La Espero konsistas duone el presado kaj duone el afranko. La kostoj de presado povus esti iom pli malgrandaj, se la kvanto de paĝoj distribuiĝus inter la numeroj en alia maniero ol dek du paĝoj kiel la normala nombro, ĉar oni presas ok paĝojn kune. Tio ne influas al la kosto de afranko.

La kunsidantoj opiniis, ke se la artikoloj ĝenerale estas pli mallongaj, kaj se estas iom pli da enhavo sur la unua paĝo, estas akcepteblaj pli maldikaj numeroj.

/ Ulla Luin

(kiu faris notojn, kaj ankaŭ helpas per sinanoncojn pri kunlaboro al la estraro!)

# Svenska Esperanto-Förbundet

SEF erbjuder dig att prenumerera på esperantotidningar för år 2005.

Du beställer tidningar genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29 - 5, SEF specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos:

**Lisbet Andreasson**  
Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby,  
Telefon 0415-50152

Tidning	Nr/år	Pris kr
Brazila Esperantisto	4	*120
Esperanta Finnlando	6	140
Esperanto	11	320
Esperanto-Dokumentoj	10	250
Esperanto en Danio	5-6	*125
Femina	4	NY 185
Fonto	12	*285
Heroldo	17	*280
ICEM	4	170
Juna Amiko (rabatt från 3 ex)	3	(100) 130
Komencanto	6	*140
Kontakto	6	190
La Hirundo	8-10	150

Tidning	Nr/år	Pris kr
La Jaro (kalender)	1	49
La Kancerkliniko	5	200
La Ondo	11	250
Literatura Foiro	6	*260
Litova Stelo	6	130
Monato	11	410
Monato, retversio		240
Norvega Esperantisto	6	100
Oomoto	2	100
Ret-Info (ange e-postadress)		*175
Rok' Gazet (pris för 3 nr)	1	*155
Scienca Revuo	4	185
TEJO tutmonde	4	100

Tidningar markerade med \* har inte lämnat prisuppgift för år 2005.

## Postgirot

Meddelande till betalningsmottagaren Följande beställes för 2005:

Tidning	Pris
	Pris
	Pris
	Pris
Sammanlagd summa	

Telefon nr:

## INBETALNING/GIRERING A

Kod 1

Till postgirokonto

14 74 29 - 5

Betalningsmottagare (endast namn)

**SEF Specialkonto**

Avsändare (namn och postadress)

Meddelande kan ej lämnas på baksidan

Från postgiro-/personkonto (vid girering)

Svenska kronor

öre

# Nu är det tid att betala UEA-avgiften för år 2005

## UEA behöver dig - Du behöver UEA

Ett starkt UEA kan hävda sig bättre i en värld, som idag mer än någonsin behöver ett neutralt språk. Stöd därför UEA med ditt medlemskap.

För din egen del betyder det att du får UEA:s årsbok med namn och adress på delegater i hundratalet länder, och om du är MA medlem får du även tid-

ningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

Vänlig hälsning

Lisbet Andreasson

Södra Rörum, Husarlyckevägen 29,  
242 94 Hörby, Tfn 0415-50152

### Avgifterna för 2004 är följande:

Kategori		
MA	Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår!	500 kr
MJ	Direktmedlem med årsbok. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår!	200 kr
MG	Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift.	80 kr
SZ	Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA.	1000 kr
PT	"Patrono de TEJO". Får tidningen Kontakto.	600 kr
DM	"Dumviva Membro" betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken.	12.500 kr
DMJ	"Dumviva Membro kun jarlibro" betalar för hela livet. Får årsboken.	5.000 kr
DPat	"Dumviva Patrono" betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständig medlem i "Societo Zamenhof".	122.500 kr
DPT	"Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet. Får tidningen Kontakto.	15.000 kr

### Postgirot

### INBETALNING/GIRERING A

Kod 1

Meddelande till betalningsmottagaren **Betalar härmed följande för 2005:**

Kategori	Kronor	Född år
För:		Telefon
Adress:		
Kategori	Kronor	Född år
För:		

Till postgirokonto

**14 74 29 - 5**

Betalningsmottagare (endast namn)

**SEF Specialkonto**

Avsändare (namn och postadress)

Meddelande kan ej lämnas på baksidan

Svenska kronor

öre

Från postgiro-/personkonto (vid girering)

Bl 2021.04 S (dec 02) 49080 02.02 Handelstryckeriet

#

#

#04#